

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 74-a radioprelego, 1964.04.29 & 05.02

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la vivo en Esperantujo.

La kampanjo **Esperanto en la lernejojn** okupas gravan lokon en la labor-programoj de niaj plej diversaj esperantistaj organizaĵoj. Vi certe interesiĝos pri kelkaj sukcesoj kaj eksperimentoj de Esperanto-Edukistaro de Svislando rilate tiun kampanjon.

En Svislando, ĝis 1958, la esperantista edukistaro ne estis grupigita en organizaĵo. Pro tio en la edukaj medioj oni povis sisteme ignori nian lingvon. Diversaj instruistoj uzis esperanton por korespondi kun aliaj instruistoj, ĉefe japanoj. Kelkaj el ili, konstatinte la avantaĝojn de la monda lingvo, ne nur por la interlerneja korespondado, sed ankaŭ por la instruado de la gepatra lingvo, ekzemple por la lernado de la neregulaj francaj verboj, redaktis artikolojn por la edukistara semajna gazeto. La artikoloj estis rifuzitaj. Kaŭzo : tio ne interesas la legantojn. Tiam kelkaj instruistoj grupiĝis en Bielo kaj fondis movadeton. Tuj poste ili resendis la samajn artikolojn al la sama gazeto, sed sub la nomo Asocio de la esperanto-edukistaro de Svislando. Grandega sukceso. La artikoloj tuj aperis. De tiam en la edukistaro oni regule aŭdis pri nia lingvo kaj iom post iom la nombro de la esperantistaj edukistoj kreskis. Plej diversaj apogoj permesis organizi grandegajn manifestaciojn al kiuj alkuris ĝis pli ol 500 personoj, radio-intervjuistoj, televido, ĵurnalistoj. Ĉio tio nur povis okazi dank'al nomo, la nomo de kelk-membra asocio !

Hodiaŭ nia Esperanto-Edukistaro de Svislando, post diversaj provoj, trovis kurs-formulon, kiu ŝajnas tre fruktodona. Mi rakontos al vi pri ĝi, ĉar eble vi povos provi la samon en via regiono. Ni rimarkis, ke kiam oni aranĝas vesperajn kursojn, tiam multaj personoj restas eternaj komencantoj, kiuj malhelpas la ĝeneralan antaŭeniradon. Ni devis do provi elmini tiun klientaron, kiu neniam esperantiĝos. Ni ankaŭ rimarkis, ke kelkajn semajnojn post la malfermo de kurso venas al ni personoj, kiuj ŝatus ankaŭ sekvi la kurson. Oni ne povas ilin akcepti pro timo ĝeni la kursanojn. Post unu jaro, kiam oni malfermas novan kurson, tiam tiuj personoj ĝenerale lernas ion alian. Ili estas perditaj por nia movado. Ni do devis trovi rimedon por ne malkuraĝigi tiujn subite interesatajn lernemulojn. Ni ankaŭ rimarkis, ke kiam la kurs-kotizo estas alta, la kursanoj pli bone lernas, ol kiam la kurso estas preskaŭ senkosta. Ĉar ili devis elspezi multon por la leciono, tiam ili bone studas siajn taskojn. Ni do pensis : Esperanto-kurso devas esti multekosta. La uzo de plej diversaj lernolibroj kaj de la rekta metodo : tuja lego de libro, kun prezento de la gramatikaj kaj stilaj malfacilaĵoj, montris, ke la rekta metodo estas pli profitiga, ol la lernolibro. La gelernantoj, kiuj tuj malfermas interesan libron por studi esperanton, interesiĝas pri la rakonto kaj entuziasmiĝas por la lingvo, kiun ili tiel rapide komprenas. Kontraŭe la gelernantoj, kiuj havas la nazon en lernolibro, ĉiam dubas pri la ebleco legi libron en esperanto. Ili havas la impreson, ke la libroj estos pli malfacilaj, ol la lernolibro. Kaj la rakontoj de la lernolibro plej ofte ne estas tre entuziasmigaj.

Sur la bazo de tiuj konstatoj ni trovis kursformulon, kiu montriĝis bona por la kaso de nia movado, por la svisa libro-vendejo kaj por la varbado.

Ni organizas prelegon pri esperanto. Venas kiel kutime nur kelkaj interesatoj. Dum tiu vespero, post prezento de plej diversaj dokumentoj, ni anoncas kurson. Ni donas ĝiajn datojn kaj mencias, ke la kurso daŭros tiom longe, kiam venos kursanoj, sed ke ju pli da kursanoj venos, des malpli ili devos pagi.

Ni elektas libron, ekzemple *Aventuroj de pioniro* de Edmond Privat, kaj devigas la kursanojn ĝin tuj aĉeti kun la du plej kompletaj vortaroj esperanto-franca kaj franca-esperanto, kiuj ekzistas. Tio estas sufiĉe alta sumo: pli ol 60 svisaj frankoj (180 steloj). Do nur venas al tiu kurso personoj, kiuj vere decidis lerni esperanton.

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 74-a radioprelego, 1964.04.29 & 05.02

Tiu kurso okazas ĉiujn du semajnojn. La instruisto troviĝas en la klasejo de la 17h45 ĝis la 22h00, dum la kurso nur daŭras de la 20h15 ĝis la 21h45. La kursanoj aŭ interesatoj do povas, antaŭ aŭ post la kurso, ricevi plej diversajn informojn aŭ korektigi personajn laborojn : leterojn, tradukojn, ktp.

Dum la unua leciono ni komencas la legon de la libro. Ni legas unu frazon, ekzercas la prononcon, klarigas la gramatikon, tradukas. Ĉiuj kursanoj legas kaj tradukas laŭvice, dum la instruisto ĉiam klarigas la gramatikon. Ni anoncas, ke ĉiu kursano rajtas frekventi neregule la kurson kaj ke novuloj povas, kiam ajn, komenci la kurson. Ni anoncas, ke kiam kursanoj estos kapablaj paroli, bone legi kaj facile traduki helpe de la vortaroj, tiam ili ricevos ekzamenajn provojn por vidi, se ili rajtas ricevi **ateston pri lernado** por forlasi la kurson. Ni kalkulas la kurskotizon tiel. Kiam ne estas dek kursanoj, la kursanoj pagas po 5 svisajn frankojn por vespero (15 stelojn). Tio estas alta sumo. Kiam estas pli ol dek kursanoj, ni decidas, ke la kurso devas alporti profiton de po 50 svisaj frankoj por vespero (150 steloj) kaj ni dividas tiun sumon per la nombro de la ĉeestantaj kursanoj.

Por faciligi la pagojn ni neniam ricevas monon dum la lecionoj. Ĉiuj pagoj okazas per poŝtmandatoj. En la kursoj ni nur notas la nomojn de la kursanoj kaj iliajn mendojn.

Provu tiun formulon. Vi tiam konstatos, ke ĉiuvespere alvenas novaj personoj, kaj ke pro la alta pago ili bone lernas, do ke ili entuziasmiĝas kaj parolas ĉie pri siaj sukcesoj. Kaj pro la altaj kotizoj la kaso de via movado rapide pleniĝas.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la vivo en Esperantujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-